3-a JARO, N-o 40 APERAS MONATE FEBRUARO 1936

# SUR POSTENO

OFICIALA ORGANO DE INTERNACIO DE PROLETA ESPERANTISTARO

REDAKTEJO-ADMINISTREJO : Bourse du Travail, 14, rue Pavée — NIMES (Gard) — Francio.
IPE-Oficejo : K-do S. J. SMITH, 36 Womersley Road, LONDON (Britio).
IPE-Centro : K-do H. HOMO, Postbox 305, LENINGRAD (U S S R).
Internacia PEK-Centro : K-do B. TURNER, Dundeestr. 60, EDINBURGH (Britio).

## Proleta Esperantistaro kaj la Neŭtraluloj

Lastatempe ni legis en kelkaj gazetoj (la ĝeneva *Esperanto*, la pariza *Franca Esperantisto*, la grenkampa *Nia Gazeto* k aliaj) diversajn konsiderojn pri ebla starigo de intimaj rilatoj inter proleta espmovado k la neŭtrala k speciale pri starigo de konformaj rilatoj inter SEU k UEA.

Tiu problemo certe ankaŭ interesas niajn diverslandajn k-dojn k tial necesas ripete klarigi la pozicion k vidpunkton de la proleta esp-istaro.

IPE k SEU restas ĉe siaj antaŭaj principoj, konsistantaj en :

1) disponigo de esp-o kiel internacia interkomprenigilo al la revoluciaj, proletaj organizoj ;

2) neo de ebleco apartigi la internacilingvan problemon for de aliaj sociaj, politikaj k ekonomiaj problemoj ;

3) aserto, ke finfine solvo de la internacia lingvoproblemo realiĝos nur post starigo de tutmonda, senklasa k senekspluata socio kun komuna tekniko k komuna ekonomia bazo.

Tiuj fundamentaj principoj antaŭdifinas, ke la tuta taktiko de IPE k de SEU, kiel sekcio de IPE certagrade respegulas taktikon de tiuj mondaj proletaj organizoj, kiuj, kontraŭbatalante kapitalismon sekvas la instruon k la taktikon montritan de marksismo-leninismo. Konservante rigore netuŝeblaj la fundamentajn principojn k celojn de sia agado, IPE k SEU samtempe bonuzas ĉiujn vojetojn k ĉiujn portempajn kunulojn, kiuj dum certa periodo povas helpi aŭ servi al la celoj de proleta, liberiga movado. En la tuta mondo la klaskonscia proletaro batalas kontraŭ la minaco de faŝismo. En tiu batalo ĝi kunlaboras ankaŭ kun tiuj rondoj k tavoloj de la burĝa intelektularo, kiuj serioze volas konservi fidelecon al la principoj de burĝa demokratio k kiuj pro tiu kaŭzo kontraŭstaras al la faŝismaj tendencoj de la regantaj rondoj k de la granda kapitalistaro. Ankaŭ kun la reformismaj organizoj, sincere kontraŭstarantaj al la faŝismo, certa unuecfronta kunlaboro estas de tiu vidpunkto ebla k aprobinda. Speciale utilas de tiu vidpunkto laboro, gvidata en tiuj amasorganizoj, kiuj entenas la proletaron k progreseman intelektularon — eĉ se tiuj organizoj estas formale gvidataj de principoj kontraŭaj al marksismo-leninismo. Certe necesas konsideri ankaŭ la specifon de SEU k de proletaj organizoj esp-istaj en landoj kapitalistaj. SEU estas la sola esp-organizo en Sovetio ; alilandaj sekcioj de IPE laboras en landoj, kie ekzistas diversaj, aliaj esp-organizoj, kun kiuj IPE devas gvidi konsekvencan, ideologian batalon. SEU kvazaŭ reprezentas interesojn de sovetiaj esp-istoj en tiuj internaciaj k fakaj organizoj, kies centroj troviĝas en landoj kapitalistaj k kies agado celas plievoluon k plivastigon de faka apliko de la lingvo (ekzemple LK, Internacia Medicinista Asocio, Internacia Asocio Sciencista, ktp). Tio difinas specialan pozicion de SEU rilate al tiuj organizoj. Alia specifeco de alilandaj sekcioj de IPE troviĝas en karaktero de ilia agado en blankaj landoj kun neleĝa IPE, kie la koncerna laboro estas neeviteble efektivigita en la kadroj de burĝaj k eĉ faŝistaj esp-organizoj.

*Franca Esperantisto* en n° 13 de 1935 esprimis esperon, ke same kiel « la soveta diplomatio trovis la vojon al Genevo por la Ligoj de Nacioj, same la gvidantoj de SEU ankaŭ baldaŭ trovos la saman vojon. » *Franca Esperantisto* esperas, ke la jaro 1937 antaŭdifinos « alproksimiĝon de SEU al UEA. »

Ni ne estas certaj, ĉu oni povas serioze antaŭkonjekti por du jaroj. Tro granda estas la minaco de la venonta milito. En la tuta mondo la regantaj rondoj antaŭpreparas sin por subpremo de siaj laboruloj k por efektivigo de konkera milito, milito, kiu devus en certaj landoj mildigi la internelandajn, klasajn kontraŭdirojn.

Se la soveta registaro decidis aliĝi al la Ligo de Nacioj — tio okazis ne pro ĝia malforteco. La soveta lando grandioze kreskigas sian industrion, sian militdefendkapablon k organizkapablon de sia laborula loĝantaro. Sovetio estas profunde konvinkita k scias, ke la milito, kie ajn ĝi komenciĝos, kaŭzos, ke en pluraj landoj falos la burĝaj registaroj. Tamen, ĉiu milito portas plej gravajn dolorojn al la vastaj amasoj, al la laborularo. Tial, se eble estas eviti la militon, se estas eble ĝin prokrasti, tiam estu bonuzataj ĉiuj rimedoj por tiu evito k por tiu prokrastigo. La Ligo de Nacioj nunamomente unuigas ĉiujn landojn, kiuj ne volas novan militon, kiuj preferas konservi la staton, kaŭzitan de la packontraktoj de la jaro 1919. Do ĝuste la Ligo de Nacioj povas prezenti iun barilon, iun forton, kontraŭantan al la milita eksplodo, se eĉ tiu barilo, tiu forto estas ne tute fifinda. Certagrade ĝi tamen povas ĝeni la militokomencon — do ĝis estas utiligebla k utiliginda tiucele. Pro la samaj konsideroj Soveta Unio subskribis asekurkontrakton kun la nuntempa Francio, kiu militon ne volas k kiu ĝin timas. Pro la samaj konsideroj Soveta Unio pretas subskribi saman kontrakton kun ĉiuj aliaj ŝtatoj, preferantaj ne riski militan aventuron, pleje domaĝontan por la laborulamasoj.

Ankaŭ en aliaj landoj la organizita, klaskonscia proletaro subtenas ĉiun organizon k entreprenon, kiu kontraŭstaras la militon k la faŝismon. Unuecfronto de laboristaj partioj en Francio, partopreno en libervola kontraŭmilita referendumo en Anglio, partopreno en diversaj internaciaj kunvenoj k kongresoj, celantaj kontraŭbatalon al faŝismo k senmaskigon de hitlerana terorismo, partopreno en organizado de koncernaj, opoziciaj ĉeloj en la kadroj de hitleranoj mem — montras plej klare, per kiuj plej diversaj vojoj estas gvidata la batalo kontraŭ militminaco, kontraŭ faŝismo — por unuecigo de ĉiuj progresemaj k subpremataj, ekspluatataj socitavoloj.

Sed tiu fleksa taktiko neniam k neniel signifas, ke estas forlasataj la principoj de marksismo-leninismo, ke la fina celo de proleta liberigo k de starigo de senekspluata senklasas socio estas forgesata.

El tiuj vidpunktoj estas komprenebla, ke ankaŭ IPE k SEU povas trovi certajn kampojn por komuna agado kun la progresema esp-istaro k ne nur en kadroj de fakaj sciencaj asocioj, ne sur sola lingva bazo, sed ankaŭ sur bazo de certaj ideoj — kontraŭ milito, kontraŭ faŝisma diktaturo. Do se inter SEU k UEA estiĝus ebla la starigo de certa kunlaboro, tio dependus de la situacio, tio dependus de tiuj pozicioj, kiujn okupos UEA, de tiuj rimedoj, kiujn povos disponigi UEA por kontraŭbatali la militon k la tutmondan reakcion. Nunamomente ni ja ĉiuokaze devas konstati, ke la « neŭtraleco » de UEA apartenas al « mitologio », ĉar esence ĝi grupigas ĉirkaŭ si la rondojn, kontraŭajn al IPE- k SEU-principoj, se eĉ la plimulto de UEA-anoj apartenas al laborularo, kies klasa esenco parencigas ilin kun la IPE-principaro.

La logiko de la klasbatalo antaŭdifinas, ke personoj k organizoj, konsekvence ekirintaj vojon de kontraŭbatalo al marksismo k leninismo, neeviteble trafas en abismon de pleja kontraŭrevolucio. Tio estas ja ĝenerale la logiko de ĉiuj bataloj. Mezaj pozicioj por aktivaj batalantoj ne ekzistas. Tiujn, kiuj opoziciis al la principoj de marksismo-leninismo en Sovetio, la logiko de batalo finkondukis en marŝon de kontraŭrevolucia terorismo k murdo, al batalo kontraŭ la proleta ŝtato. Ankaŭ en nia esp-ista tendaro ni povis bone observi kiel lantiismo k sennaciismo komencinte per neo al marksisma-leninisma, nacia politiko plej konsekvence ekatakis la proletan ŝtaton, plej gravan defendanton de la tutmonda paco, komencis instigi siajn adeptojn al organizado de kontraŭrevolucia agado. Certe dum iuj kondiĉoj sur iu certa kampo ni povus ekiri komunan fronton, ankaŭ kun tiuj satanoj, kiuj kontraŭstaras en siaj landoj al la milito, al la faŝismo. Sed ankaŭ tiam ni devos memori, ke la nuntempa SAT estas estrata de danĝera, idealisma, kontraŭrevolucia ideologio, ke ĝuste tiu ideologio povas malhelpi nin en niaj finaj celoj.

Inter la esp-istaj amasoj troviĝas multaj sinceraj

pacifistoj, celantaj la realigon de la ideoj de doktoro Zamenhof. Tiujn pacifistojn ni devas utiligi por la kontraŭbatalo al la milito k al la faŝisma terorismo. Diversaj organizoj k diversaj gazetoj esp-istaj helpas al tiu kontraŭbatalo en diversaj gradoj. Ni bone traktas ilian nefirmecon k povas konsideri ilin ĉiujn nur kiel « provizorajn kunmarŝantojn » sur nia vojo. Estis tempo, kiam *Heroldo de Esperanto* reprezentis progreseman alon de la neŭtrala movado. Post certaj, politikaj okazintaĵoj en Germanio la sama *Heroldo* ekprovis propagandi la hitlerismon. Post valora aperigo de libroj de Remarque k de Toller, la eldonejo de *Heroldo* nun okupas sin pri publikigo de libroj pri « rasa purismo ». Progresema *Literatura Mondo* apud progresemaj verkoj de Baghy, de Engholm, de Weinhengst (certe ankaŭ ne liberaj de sentimenta liberalismo) nun publikigas la verkojn de Mussolini, ĉikanan pamfleton pri Sovetio de Slonimski k romanon de Jelusiĉ (Cezaro) prezentantan jen apologion de cezarismo, de individua diktatorismo. Komplika do estas la situacio inter la neŭtralaj esp-istoj. Tial tre fleksereaga k samtempe tre klara, tre preciza k konsekvenca devas esti la taktiko de proletaj esp-istoj en iliaj rilatoj kun la « neŭtralaj » esp-istaj organizoj. Tiun aksiomon certe la « neŭtraluloj » ne komprenas k kompreni ne kapablas. En *Nia Gazeto*, ĝia redaktoro s-ro Grenkamp vaste praktikas la metodon de burĝa ĉikanado pri Sovetio, pri luksaj aŭtomobiloj de sovetiaj diplomatoj, pri la dancantaj oficiroj de ruĝa armeo, ktp. Evidente tiu informado pleje konformas al la kulturnivelo de la redaktoro de tiu gazeto k tiu informado permesas samtempe al s-ro Grenkamp kaŝi aliajn faktojn, ekzemple pri centmiloj da aŭtomobiloj jam produktitaj en Sovetio, kie en la jaro 1926 ekzistis apenaŭ 25.000 da tiuj modernaj transportiloj, tiutempe ĉiuj importitaj el aliaj landoj. Babilante pri la dancoj s-ro Grenkamp ricevas eblon prisilenti la ĝeneralan kreskon de kulturo, de bonstato, de la vivnivelo) de sovetianoj. Per tiu etburĝa ĉikanado s-ro Grenkamp intime ligiĝas kun Lanti, ĉar same Grenkamp k same Lanti — ĉiu en sia medio k por sia medio povas kompromiti la sovetan ŝtaton.

Jam ne ĉiam k ne ĉiuj tiuj ĉikanoj estas rebatindaj. La faktoj, la atingoj de Sovetio atestas ja mem pri mensogeco de tiuj ĉikanoj. Tamen ni devas malkovri la ĉikanantojn, kompreni ilian socian esencon, ilian malutilistan rolon. Iliaj pozicioj devas difini ankaŭ la niajn poziciojn. Ankaŭ tiun nian taktikon ne ĉiam komprenas la « neŭtraluloj », konscie aŭ senkonscie servantaj al la pleja reakcio.

S-ro Grenkamp esprimas miron, ke en *Sur Posteno Klasbatala* k-do Demidjuk senmaskigas lian kontraŭrevolucian rolon k identigis tiun rolon kun la rolo de Lanti. Por sin « malkompromiti » s'ro Grenkamp aludas gratulon, kiun ricevis *Nia Gazeto* de E. Drezen. Estas domaĝe, ke s-ro Grenkamp ne represis la gratulon, ricevitan de NG, tiam oni povus vidi la datojn k la kaŭzojn de tiu « gratulo ». Se pro la unua n-o de NG povis ekzisti iu espero, ke NG provos ludi en la esp-ista, neŭtralula movado rolon de antaŭa, pacifisma, ideisma *Heroldo*, do poste ĝi plej konsekvence akiris karakteron de bulvarda gazeto, ĉikananta Sovetion.

Se k-do E. Drezen esperis, ke sur certa kampo k en certaj rondoj NG servos al interesoj de paco k al plia interkompreniĝmo de diverslandaj, kontraŭfaŝistaj elementoj — do nun k-do Drezen certe devas konfesi, ke tiu lia atendo estis vana. Pliprecizigo de pozicioj de NG kaŭzis konceman pliprecizigon ankaŭ de niaj pozicioj. Tio ne signifas, ke NG k ĝia redaktoro (same kiel aliaj presorganoj esp-aj) ne suferos multajn novajn transformiĝojn en sia idearo. Ĉiu simila transformiĝo devos esti taksata k konforme al tiu takso ĝi devos esti laŭpove utiligata en certaj kondiĉoj k en certaj situacioj, sen cedo en propreco al ni finaj celoj k fundamentaj principoj de nia agado.

*IPE-Centro k CK de SEU.*

# Letero de Minlaboristoj el rajono Postyŝevo (Sovetio)

Karaj kamaradoj,

Ni, minlaboristoj el Postyŝevo (Donec'a karbobaseno) sendas al vi kun aparte varmega saluto ĉi-tiun leteron.

Ni havas la deziron rakonti al vi niajn rememoraĵojn pri la pasita vojo, pri tio, kiel vivis la laboristoj de nia minejo antaŭ la revolucio kaj kion ni havas nun, liberiĝinte de l' kapitalistoj.

Kiam ni rememoras pri la antaŭrevolucia tempo, fariĝas terure, apenaŭ ni povas kredi, ke povis sufiĉi fortoj por elporti la bagnan laboron, fordoni ĉiujn fortojn, la vivon fordoni, kreante riĉaĵojn por areto da parazitoj. Ni laboris kaj vivis tiam en nehomindaj kondiĉoj. La karbo estis elminigata per pioĉo kaj kurbhakilo, oni sciis neniujn maŝinojn aŭ teknikilojn. La karbo en la galerio estis transportata per glitveturileto, kiun tiris la laboristo, enjungita per trenrimenoj, cent metrojn, se necesis, aŭ eĉ pli ; la laboristo devis anstataŭi ĉevalon ĉar la homa laborforto estis malpli kara ol la ĉevala. En la mineja galerio la akvo fluis torente, kaj vintre, elirinte el minejo, la laboristo tuj kovriĝis de glacio kaj, ne havante, kie sin sekigi, li devis iri hejmen al sia terkabano tutajn du kilometrojn. En la terkabano estis koto ĝis la genuo. La pluvo kaj la fandiĝanta neĝo enfluis en la loĝejon kaj faligis la terkabanon.

Post dekhuhora labortago, la laboristo laca ĝis senfortiĝo, kuŝfalis malpura sur malpuran liton, jetinte en angulon la malsekan vestaĵon. En terkabanoj loĝis la laboristoj, havantaj familiojn, kaj la fraŭlaj dormis super la kaldronoj en la kaldronejo. La kaldronejo mem estis granda lignotabula barako. La vento kaj pluvo facile penetris internen tra la truoj kaj fendoj. En la barako libere vagis traventoj kaj malvarmo.

Oni ankaŭ tre suferis pro manko de trinkebla akvo. Oni trinkis akvon el puteto farita en la raveno, ĉerpante ĝin el la koto. Oni ankaŭ trinkis minejan akvon kaj pro tio malsaniĝis je stomakkataro, disenterio. Ne pasis tago sen iu morto aŭ akcidento. La minejo ne havis hospitalon. La minejo estis fondita en 1911, sed dum kelkaj jaroj eĉ ne estis simpla ambulatorio. Fine la akciuloj permesis aranĝi ambulatorion el unu ĉambro, sed sen konstanta kuracisto por la minejo, la kuracisto venadis nur por akcepti la pacientojn. La minejo havis por 1.000 laboristoj unu kuracist-helpanton.

Lernejo por la infanoj de l' ministoj forestis. La laboristoj petis la mastron malfermi almenaŭ duklasan lernejon, sed la mastro rifuzis.

En tiaj neeelporteble-pezaj kondiĉoj vivis kaj laboris niaj ministoj. Laboristo pri eligo de l' ŝtonaĵo en la minejo ricevis por sia laboro 0,15 rubl. (15 kopekojn) tage, la direktoro de l' minejo ricevis 85.000 rublojn jare !

Sed tiu koŝmaro finiĝis. Ni rememoras tiun vivon kiel pezan sonĝon. Sed tiu terura nokto pasis. Nun ni havas helan sunan tagon. Venis granda ĝojplena vivo kaj la malfacilaĵoj nin ne timigas, ĉar ni nun laboras por ni mem, ni konstruas niian propran vivon.

Pasis dekok jaroj. El ili pli ol tri jaroj pasis en kruda batalo kontraŭ la malamikoj, kiuj klopodis elŝiri el niaj manoj nian feliĉon — nian liberon. Ĉu vi scias, karaj kamaradoj, ke la blankaj banditoj estis murdintaj tutajn ministajn urbetojn kune kun la virinoj kaj infanoj, kaj je kadavroj estis plenplenaj la ŝaktoj.

Kelkaj jaroj estis necesaj por la restarigo de l' ekonomio. Kiom da fortoj kaj laboro ni devis elspezi por purigi la minejojn kaj rehavi la eblecon en ili labori ! Kun granda malfacileco ni reordigis la ekonomion kaj nun funkciigas ĝin plenvapore.

Ni nun laboras ne 12 horojn, sed 7 horojn tage.

Sed tiujn 7 horojn ni laboras per la lertaj manoj de l' konstruantoj de sia propra vivo. Supre altas la supermineja konstruaĵo, kie en grandegaj blindige lumbrilantaj haloj staras kolosaj maŝinoj, funkciigataj per la sperta mano de l' laboristo, kiu fariĝis la mastro de sia minejo. La maŝinoj supren — kaj malsuprenlevas en la trankvile moviĝantaj kabinoj de l' liftoj la laboristojn en speciala porlabora vesto. La maŝinoj elpumpas la akvon el la minejo kaj plenigas ĝin per torentoj da elektra lumo, ili purigas la aeron je la malutilaj gasoj kaj disverŝas tra ĉiuj anguloj de la minejo ondojn de pura aero. La lumo superverŝas la larĝajn kaj longajn galeriojn kaj putojn de l' minejo. Laŭlonge de l' muroj estas aranĝitaj lignaj trotuaroj, sub kiuj murmurante kuras la akvo. Apud la lifto en la minejo instaliĝis la medicina punkto. Tra la minejo kuras trajnoj : vagonetoj, plenaj de karbo. Ilin trenas elektro-lokomotivoj. Ne plu la homoj, sed la maŝinoj nun transportas la karbon. En la elbatejoj la pezan laboron de l' karbohakistoj faras nun specialaj ensegiĝantaj maŝinoj (perforatricoj).

Ĉe ni, en la Donec-baseno, estas nun organizita tutregiona konkurso « produktada kampanjo je la nomo de l' 18-a datreveno de l' Oktobra revolucio ». Niaj ŝturmuloj partoprenas en la konkurso kaj per la perforatricoj nun faras dum unu deĵoro ne plu 30 metrojn, sed ofte eĉ 180 metrojn. La maŝinoj estas en bona stato kaj la reguloj de teknika ekspluatado de l' perforatricoj estas bone plenumataj. La plej bona ŝturmulo (aplikanta la novajn labormetodojn de l' laboristo Staĥanov de nia loka minejaro), k-do Jukov, maŝine elhakis dum 3 horoj 320 tunojn da karbo.

Plej bonaj ŝturmuloj k-doj Laberko kaj Golovlev maŝine elhakis perskaŭ 3.500 metrojn dum 10 tagoj kaj perlaboris por monato po ĝis 1.000 rubloj. Sed Laberko kaj Golovlev ĉe ni ne estas solaj, ni havas multe da similaj ŝturmuloj, ja ĉiu deziras esti plej bona ŝturmulo. Ja ni laboras por ni mem, ni konstruas nian propran vivon. Kaj nia vivo ja plu ne estas komparebla kun la antaŭa.

Nun ĉiu laboristo havas sian dometon, ĉirkaŭitan de verdaĵo. Li havas legomĝardenon kaj mastrumon — porkidojn, birdaron, iufoje bovinon. Dum 4 jaroj elkreskis la plantita de ni parko de junaj arboj, meze de ĝi, sur altaĵo, turas belega konstruaĵo : nia Palaco de Kulturo. En la Palaco estas teatra halo, kie ĉiutage estas demonstrataj filmoj aŭ teatraĵoj ; funkcias biblioteko, rondetoj ; nedelonge estas organizita kabineto de internacia laborista korespondado. Niaj ministoj havas nun belegan hospitalon kun multnombra kuraca kaj flega personaro. Ni havas kelkajn lernejojn, laboristan fakultaton, infanĝardenon. Apud la minejo estas instalita banejo, kie post la laboro la ministo povas sin bani aŭ duŝi.

Kaj nun nia laboristo ne estas plu rekonebla, kiam en libera tempo li promenas kun la edzino aŭ la kamaradoj. Ĉe ni estas laboristoj-ŝturmuloj, kiuj havas proprajn aŭtojn, ricevitajn premie por sia ŝturma laboro.

Ĉiuj niaj infanoj nun lernas. Kaj la edzinoj, se ili ne laboras, ankaŭ partoprenas kun ĉiuj en la socia laboro.

Minlaboristoj el rajono Postyŝevo.

---

La Donеclandaj SEU-Kom-ato k PEK-C. komencis organizi amasan kolektivan interligon de Staĥanovanoj, orden-posedantoj k honoraj homoj de ŝaktoj, uzinoj, fervojoj k kampoj de Donbaso, kun eksterlandaj revoluciaj lab-istoj k kamparanoj, organizoj k apartaj klaskonsciaj lab-istoj. Ni petas ĉiujn laborulojn dezirantajn komenci interligon kun eminentaj lab-istoj k kamparanoj Donbasaj urĝe sendi siajn adresojn al :

K-do Jurgensen (PEK-Centro), poŝtkesto N 120 — STALINO (Donbas).

Al ĉiuj UK-oj, LEA-oj, landaj PEK-centroj k PEK-bultenoj granda peto : estu organizantoj k perantoj de ĉi interligo k utiligu ricevotajn el Donbaso leterojn k materialojn por la revolucia presaro.

# PEK-angulo

Karaj Kamaradoj,

La Ukrainia Komitato de SEU danke kvitancas al la alilandaj k-doj k organizoj la regulan ricevadon de : *Sur Posteno* (Amsterdam - Antverpen), *Ruĝa Esperantisto* (London), *Contact* kaj *Britia PEK-bulteno* (Edinburgh), *Proleta Esperantisto* (Nimes), *Francia PEK-bulteno* (Paris), *SLEA-aktivisto* (Malmö), *Svisia PEK-bulteno* (Bern), *Mondo* (Shanghaï) ; lasta numero ricevita : N°I, 1935, Ĉinia *PEK-bulteno, Revuo* (Ĉinio), *Austria PEK-bulteno* (Wien), *Ruĝa Informilo* (Riga), *GLEA- PEK-bulteno* (venis nur 2 N N), *Belga proleto* (Antverpen).

Ni tute ne ricevis la bultenojn eldonatajn de daniaj, norvegiaj, japaniaj, usonaj k-doj.

Nia Komitato gvidas la filiojn de SEU en la Soveta Ukrainio, tiuj filioj havas nun pli ol 4.000 membrojn kaj « amikoj de internacia esperanto-korespondo » (membroj-simpatiantoj). Por la aktivularo ni eldonas (nacilingve) la bultenon *Internacionala Brigado*. Kelkajn specimenojn ni sendas al vi interŝanĝe por viaj valoraj senditaĵoj.

Jen la resumita enhavo de la sendataj N N :

— N° I (9) : La VII-a tut-Unia Kongreso de Sovetoj kaj la taskoj de la proletaj esperantistoj de Ukrainio. — Anoncoj.

N° II (10) : La dua Kongreso de IPE. — Tra Ukrainio (esp-movado kroniko).

N° III (11) : Pri la unumaja kampanjo. — Laborimiti la esperantistojn el Krivoj-Rog. — Kiel komenci la korespondadon. — Tra Ukrainio (movada kroniko).

N° VI (12) : Fortan subtenon al la dua Kongreso de IPE. — Pri la laboro de SEU dum somero 1935. — Eksterlande (movad-novaĵoj). — Tra Ukrainio (movad-kroniko).

N° V (13) : Ni sukcese finu la varb-kampanjon. — Tra Ukrainio (movada kroniko).

En niaj bultenoj ni volonte aperigos la adresojn de korespondemaj k-doj kaj grupoj. Se vi havos tiajn por ni — sendu al nia adreso :

« Esperanto - Unio »,
Palaco de Laboro, 61,
HARKOV - 31 (USSR).

---

PEK - FILIO *Mor. Ostrava* FONDIĜIS
(Ĉeĥoslovakio)

La IPE-organizoj kaj PEK-filioj de tutmondo (precipe de Sovetio) estas petataj nepre sendi al ni siajn organojn, PEK-bultenojn, kaj aliajn eldonaĵojn. PEK-filio Mor. Ostrava havas kontakton kun kelkaj redakcioj kaj Asocio de sovetamikoj, kiuj volonte taŭgan materialon utiligos.

Post pristudo de alilandaj PEK-bultenoj ni intencas eldoni ĉeĥoslovakan bultenon.

Adreso : Matej Jaroslav, Vyškovice, 84, u — MOR. OSTRAVY (Ĉeĥoslovakio).

## PRI UNU EL BRANĈOJ DE LA PEK-LABORO

Pri organizado de kolektiva korespondado oni jam multe skribis. Sed pri eluzado de individua korespondado por PEK-celoj oni tre malmulte skribis. Ja celo de ĉi artikolo estas priparoli la individuan korespondadon. Mi opinias ke aldonante al la kolektiva korespondado la unuan lokon, oni ne devas lasi la individuan korespondadon en ombro. Male bone kaj ĝuste direktante la individuan korespondadon ni ankaŭ ekpovas eluzi ĝin por la PEK-celoj. Jen kiel faras mi : Mi korespondante kun niaj korespondantoj kaj sciigante ilin pri vero pri Sovetio, alvokante ilin batali kontraŭ milito kaj faŝismo kaj por Unueca Fronto petas ilin legi miajn leterojn al siaj konatuloj, al siaj kunlaborantoj. Mi ankaŭ faras la samon, kiam mi ricevas leterojn de miaj personaj (do-individuaj) korespondantoj. Tiamaniere estas eble transformi la individuan korespondadon je kolektivan. Kaj ĝi estas efektive. Jen estas iom da ekzemplo. Korespondante kun iu skandinava (mi petas redakcion ne presi la landon) k-do mi petis lin legadi laŭtvoĉe miajn leterojn al siaj kunlaborantoj. Jam post la unua voĉlegado la aŭskultantoj superŝutis lin per la demandoj, kiujn mia korespondanto starigis al mi. Mi respondis al la demandoj kaj nia agado estis tiel efektiva, ke la majstro, de la entrepreno kie laboris mia korespondanto, enmiksis sin kaj kontraŭis la laŭtvoĉlegadon. Sed la semo estis enĵetita.

En alia lando en loĝejon de nia korespondanto kunvenadis liaj konatuloj kaj ĉiam aŭskultas miajn leterojn.

Unu... ano (mi nenie skribas landnomon, por oni ne persekutu la korespondantoj) regule individue korespondante kun mi skribas al mi : « Mi ĉiam legas laŭtvoĉe viajn leterojn al niaj laboristoj kiuj kunvenas en nia klubejo. ...Viaj leteroj tre helpas al mi batali por Sovetio kaj por Unueca Fronto. ...Jen estas la demandoj de niaj kamaradoj, kiuj interesiĝas pri Sovetio kaj volas scii la veron pri ĝi... ktp. »

La ekzemplo, laŭ mia opinio, klare montras, ke ĝuste organizita kaj direktata individua korespondado povas plenumi sufiĉe grandan taskon, ne tre malpli ol la kolektiva korespondado. La lasta sendube estas pli grava, sed ignori la kolektivan korespondadon laŭ mia opinio estas malĝuste !

La individuaj leteroj povas enigi tien, kien la kolektivaj leteroj neniam eniros.

Mi denove ripetas ke la celo de mia artikolo ne estas iu ajn provo anstataŭigi la kolektivan korespondadon per la individua. Ne ! La lasta devas helpi al la unua kaj plenumi la samajn celojn, ol la kolektiva korespondado. Sed ĉar jam oni multe skribadis pri la lasta, sed preskaŭ nenion pri la individua korespondado mi decidis skribi pri ĝi la artikolon kaj tre deziras aŭdi la opiniojn de PEK-uloj.

Mi opinias, ke vastigante la kolektivan korespondadon, necesas samtempe vastigi la individuan penante, ke ĝi plenumu la taskojn de la kolektiva (eĉ nerekte : per la kolektiva legado de individuaj leteroj).

La PEK-centroj nepre devas (laŭ eblo) gvidi (eĉ kontroli) la individuan korespondadon. Ĉi tion mi faras (kun samurbanoj) tralegante ties leterojn, konsilante kion respondi k. t. p., kun aliurbanoj la samon povas fari tieaj urbaj PEK-centroj (PEK-gvidantoj). Ĉiu individua korespondanto devu fariĝi la centro de kolektiva PEK-laboro. Por ĉi celo mi proponas aranĝi la regulan interŝanĝon de listoj de korespondantoj kaj dezirantoj korespondi.

La eldonadon de ĉi listoj devas prizorgi la PEK-centro.

Al mi estas tre dezirinde ekaŭdi la opiniojn de tiuj gekamaradoj kiuj havas pli grandan sperton en PEK-laboro, ol mi mem.

Mi petas respondi senpere al mi laŭ jena adreso:

Inĝeniero Viktor Gruŝko, Socialistiĉeskaja 169, kv 4 — ROSTOV (Don) U. S. S. R.

# Informoj de IAREV

## KION OPINIAS PRI ESPERANTO LA AVANGARDA MOND-LITERATURO ?

IAREV deziras kolekti por publikigi en esperanta kaj rusa lingvoj (en tiu lasta lingvo-libroforme) la opiniojn de la avangardaj verkistoj el ĉiuj landoj *pri la rolo de esperanto por la liberiga batalo de l' laborista klaso* kaj por la celoj de l' defendo de kulturo kontraŭ la faŝismo.

Ni petas ĉiujn laboristajn esp. asociojn kaj la IAREV-anojn el diversaj landoj en interkonsento organizi en la koncerna lando enketon pri la du supraj punktoj (v. la unuan alineon).

Plej rapide decidu inter vi, kiel praktike organizi la aferon en via lando (aŭ lingvoteritorio) kaj tuj alpaŝu al la realigo, senprokraste. Konatigu al la demandotoj la antaŭe jam eldiritajn pozitivajn opiniojn pri esp-o de H. Barbusse, R. Rolland, L. Renn, M. Gorkij.

Alsendu al ni la ricevitajn respondojn (originalojn !), sur *aparta* folieto kunsendu la esp- tradukon de la respondo kaj malgrandan karakterizon pri la aŭtoro (kun listeto de la plej gravaj verkoj de tiu aŭtoro).

Vi bone komprenas ke ĉi-tiu internacia enketo ne nur utilos al la esp-literatura movado, sed ĝi povas havi kolosan signifon por la tuta lab. esp. movado. Ĝi estas ne nur literatura afero. Tial ni refoje petas ĉiujn lab. esp. asociojn, grupojn kaj aktivulojn kontribui al la plej rapida kaj maksimuma sukceso de la enketo. Tio dependas de via propra aktiveco. Memoru, kiom la rezultoj de l' enketo povas akceli la progreson de viaj propraj organizaĵoj !

*IAREV.*

---

## NI HAVU RIĈ-ENHAVAN, REGULE APERANTAN LITERATURAN REVUON

La imitinda varbado de abonantoj por « Internacia Literaturo » fare de l'orient-aziaj k-doj ebligis la aperon de l' n° 1 de « I. L. » kaj la baldaŭan eldonigon de l' n° 2 (certaparte). Tamen la tasko de nia sindonema k-do Bourguignon restas ekstreme peza. Pli ol 3/4 el la abonantaro de « I. L. » estas sovetiaj k-doj. Sed ja la abonpago de tiuj k-doj ne estas transpagebla en mono al la eldonejo kaj tial provizore la sorto de nia gazeto dependas de la aktiveco de niaj okcident- kaj nord-eŭropaj k-doj.

Ju pli da abonantoj estas varbitaj, des pli la gazeto estos ampleksa. La amplekso signifas ne nur ke vi ricevos *pli* da legaĵo, sed ankaŭ legaĵon multe pli interesan. Ja konsideru ke hodiaŭ multe da belegaj rakontoj kaj noveloj ne estas preseblaj, ĉar ĉiu el ili estas pli ampleksa ol tuta nuna numero de « *Int. Literaturo* ».

Ĉiu IAREV-ano kaj IAREV-amiko, ĉiu laborista esperanto-grupo abonu kaj abonigu nian revuon

INTERNACIA LITERATURO.

Rekomendu ĝin al viaj amikoj, samasocianoj kaj korespondantoj.

Nia revuo devas havi ne malpli da abonantoj en Britio, Svedio, Nederlando, Francio, Belgio, Usono, Hispanio, ol ĝi havas en Ĉinio.

Tiam la revuo estos pli ampleksa, ankoraŭ pli riĉ-enhava, ĝi aperos ankoraŭ pli ofte.

La abontarifo estas : 10 fr. fr. (aŭ egalvaloro) por 4 kajeroj. En Sovetio - 2 rubloj.

La abonpagon sendu al H. Bourguignon, *Besse-sur-Issole* (Var) — Francio.

Sovetianoj — al CK SEU.

# « Bankedo » de Maksim Rilski

Lady, mylordoj, messieurs kaj mesdames !
Mi vin invitas en halon !
For pri buĝeto, ĵurnal', telegram' !
He ! Orkideojn, konvalojn !
Grakas la korvoj pri kriz' kaj bankrot' —
Fi ! ne atentu, sinjoroj !
Ostrojn, ĉampanon kun ĝu' de erot'
Donu por peli angoron !
Aŭdis ni jam pri « nuntempa moment' »,
Bankoj, salajro, akcioj.
Faru por ni modernul-Dezesent'
Pompan likvor-simfonion !
Kaj la ekkis', kvazaŭ fajna biskvit',
Likvu sur lip' kaj en buŝo,
Kaj ekturniĝu la mond' en irit'
De la fokstrota kuntuŝo !
Pordojn al ŝlos' ! ĵaluziojn al teg' !
Plie akceptu neniun !
Kaj Vatikan', se minacas venteg',
Skribu la noton al dio !
Pordojn al ŝlos !... ŝtopu truojn je l'son !...
Sunon el halo pelĉasu !
Ha, do vi kantu, malben-violon' !
Kiu ? Diabl' ! Ne enlasu !
Lady, mylordoj, messieurs kaj mesdames !
Al patriotoj tostgloron !
...Kiuj jen ?
Kiuj jen ?
Kiuj jen —
Jam
Venas al muroj, sinjoroj ?
Frajo, pasteĉo, aĵuro, nud-ĉarm',
Ŝercoj, likoroj amsentaj...
Ho gesinjoroj ! Ja vanas alarm' !
Fostu ni saĝon prudentan !
Karbo kaj oro sufiĉas en ter'
Por nia festa ekzisto !
Lady, mylordoj ; mesdames kaj messieurs !
Saĝ' estas ja — optimisto.
Rondas tra hal' papilioj en flirt',
Flosas parfumo kaj putro...
Koron varmigu per spica malvirt',
Penson morfinu en nutro !
Senlaboruloj ? Malsat' ? Kie vi —
Pres', parlament', kugloj-piko ?
...Vidu : rebrilas en glas' incendi'...
Ludu, dormanta muziko !
Trinku kaj kisu, ho lipoj-karmin' !
Laŭtu kaj kriu ! Svendancu !
Kiuj jen ?
Kiuj jen
Kun la obstin'
Niajn palacojn balancas ?
Kio en la orient' nubas jam ?
Ki' okcidente jam blovas ?
Lady, mylordoj, messieurs kaj mesdames !
Ĉesu, ekhaltu en movo !
Ha, komedio ! Kaj leĝo ja as,
Temploj kaj ankaŭ karceroj.
Al punĉ' maraskin' ! Al « cruchon » ananas' !
Trompo al am' ! — Ĝojliberu !
Sed ne konsentos ja laboristar'
Tiujn danĝerajn ekprovojn...
Se ne konsentos, — kuracos sen bar'
Ni bolŝevismajn mikrobojn.
Ho, ĉu malmultaj doktoroj kun fam'
Pri la metodoj efikaj,
Nu, laŭbezone, messieurs kaj mesdames,
Ni sangellason aplikos !
— Brave ! Mirinde ! Ni ĝoju sen gal' !
Aj, nia mahstro-genio !
...Tss, eksilentu... For lumojn en hal' !
Ĉes' ! Violonoj rabiaj !
Kiom da ili ?
Aŭ du
Aŭ dek,
Cent ?
Kiuj do ?
Ho, milionoj !
Kiuj jen —
Kiuj jen,
Kiuj do jen
Tute frakasas la tronojn ?
Hundojn ! ! Soldatojn, murdistojn al band' !
Multajn promesu donacojn !
Monon ! Masakrojn !
Sed kia jen kant'
Sonas en sangaj do spacoj ?
« He, malsatuloj, leviĝu por bat' !
Aŭdu ! Ekludis trumpetoj ! »
— Ho, gesinjoroj ! Ektostu al sat',
Lastaj jam eble glasetoj !
Kiuj jen ?
Kiuj jen ?
Kiuj jen ?
Jam
Fera pordego ekfalas...
Lady, mylordoj ! Messieurs kaj mesdames !
Estas venen' en pokaloj !

(El ukraina lingvo tradukis Eŭgeno Mihalski)
*Stalino-Donbass.*

## Abontarifo al " Sur Posteno "

| Lando | Monunuo | 6 ekz. | jarab. |
|---|---|---|---|
| — | — | — | — |
| Argentinio | p—p | 0.80 | 1.50 |
| Aŭstrio | ŝil | 1.10 | 2 |
| Belgio | belgo | 1.30 | 2.50 |
| Brazilio | milr | 2.80 | 5 |
| Britio | ŝil | 1/9 | 1/5 |
| Bulgario | levo | 30 | 50 |
| Ĉ. S. R. | kr. | 5 | 9 |
| Danio | kr. | 1.10 | 2 |
| Estonio | kr. | 0.65 | 1.25 |
| Finlando | mk. | 8.50 | 16 |
| Francio | fr. | 3 | 6 |
| Germanio | mkg. | 0.80 | 1.50 |
| Hispanio | pes. | 2.25 | 4 |
| Hungario | pengo | 1.10 | 2 |
| Japanio | jen | 0.80 | 1.50 |
| Jugoslavio | din. | 9.50 | 18 |
| Latvio | lat | 1.15 | 2 |
| Litovio | litas | 1.80 | 3.50 |
| Nederlando | g | 0.60 | 1 |
| Norvegio | kr. | 1.10 | 2 |
| Polio | zlot | 1.30 | 2.25 |
| Portugalio | esk | 3.70 | 7 |
| Rumanio | lej | 30 | 50 |
| Sovet-Unio | rub. | 1.60 | 3 |
| Svedio | kr. | 0.85 | 1.60 |
| Svisio | fr. | 0.95 | 1.80 |
| Usono | dolaro | 0.40 | 0.70 |

Ceteraj laŭ tarifo de Svisio

Abonpagon sendu per poŝtmandato al jena adreso : Jean Meynadier, Quartier de la Grotte des Fées, Le Gai Logis, Nimes (Gard), Francio.

Abonejo por Sovet-Unio : CK de SEU, Moskvo, Spiridonovka 15

La abono validas nur post pago.

Neniam forgesu legeble skribi vian plenan adreson.

# Korespondado

Tarifo : trilinia anonco kostas 2 respondkuponojn. Ĉiu plia linio kostas 1 respondkuponon.

## SOVETIO

Juna lernantino dez. kor. kun pioniroj. Adreso : Kuznecova, Karla Libknehta 17 — ĈUGUJEV.

Junaj pioniroj k komjunuloj el la infana laborkomuno « Feliks Dzerĵinski » dez- kor. kĉl lernantoj, pioniroj, laboristoj, pĉt k interŝanĝi PK, gaz., ĵurn., ktp.
Adreso : HARKOV — 54 desopark. Komuno Dzerĵinski (al esperanto-grupo).

Lernantoj, junaj pioniroj k komjunuloj de l' 21-a modela lernejo (12-17 jar) dez. kor. kĉl lernantoj, pioniroj, lab. junularo k plenaĝaj lab-istoj k interŝ. PK, gaz. ĵurn., ktp.
Adreso : HARKOV — Placo Feuerbah, 8 21-a Ŝkola (Esperanto-grupo).

20-aĝa studentino de pedagogia teknikumo dez. kor. kun gek-doj : lab-istoj, instruistoj, studentoj k kamparanoj el la landoj : Anglio, Nederlando, Latvio, Alĝerio, Palestino, ktp. Certe respondos.
Adreso : k-dino Jur-Times, Pedagogia teknikumo — ENAKIEVO (Donbass).

K-do Stefanovv, B. N. LENINGRAD « 14 », str. Nekrasova 58, kv. 39 a, dez. kor. kun gelab-istoj komercsindikataj el ĉl.

K-do Pisarev, V. B., LENINGRAD « 9 », Lesnoj pr. 13/8, kb. 64 interŝanĝas esp-ajn gazetojn k ĵurnalojn.

Pioniroj de kompleta meza lernejo en Ĉugujev (15-16 j.) dez. kor. kĉl k-doj, precipe junuloj, infangrupoj ks. pĉt. Adreso : S. N. Oniŝĉenko, Novo-Sadovoja 3 — ĈUGUJEV (Ukrainio).

Studentoj del' Harkova Pedagogia Instituto dez. kor. kĉl studentoj, geinstruistoj, gelab-istoj pĉt k interŝ. PK, gaz., ĵurn., ktp.
Adreso : HARKOV — ul. K. Libknehta 33, Pedagogiĉeskij Institut. Kruĵok, Esperanto.

Pioniroj junkom-istoj de Kadijevka mezlernejo dez. kor. kun lab-istoj, pioniroj-esp-istoj k membroj de Internacia Lab-ista Helpo.
Adreso : Esperanto - Rondo. Mezlernejo imeni « Celuskin » KADIJEVKA (Donbass).

K-do Gusev, K. M. Ĉerniŝekvskogo 30 — VORONEĴ — dez. kor. kĉl. Nepre skribu ! Respondo garantiata.

## FRANCIO

K-do L. Manuel, rue de la République, 69, — DRANCY (Seine), dez. kor. kĉl, pĉt, k interŝ. PKI. Certe respondos.

## SVEDIO

Juna sveda tajloro dez. kor. kun sovetiaj gekdoj (ankaŭ germaniaj) de sama profesio. Respondo garantiata. Skribu al : k-do Allan Alm, Box 24 B, HORNDAL.

## AŬSTRALIO

Mi dez. kor. kun junulo aŭ junulino de dek ses aŭ dek ok jaroj. John Millican, 5 Eden Street, Hootscray W 11 — MELBOURNE (Victoria).

## ĈEĤOSLOVAKIO

Mi dez. interŝanĝi PM. Raŝka Karel, Oparska 207 — MOR. - OSTRAVA. HORY.

## FINNLANDO

Mi informas miajn korespondantojn, ke mi liberiĝis el la malliberejo 7 Sept. 1935. Mi dankas al ĉiuj, sed mi ne povas daŭrigi la korespondadon pro financa malfacilo. K-do Ojanen Toivo, MAARIA.

## NORVEGIO

Mi dez. kor. kun gek-doj eĉl pri ĉt. K-do Fridolf Lindholm, Universitetsgt. 26, OSLO.

Mi dez. kor. kun gek-doj eĉl pĉt. K-do Otto Bothner, Jens Bjelkesgt. 79, II, OSLO.

Imp. Coop. LA LABORIEUSE, rue J.-B.-A. Godin, 7, Nîmes